


DUONMONATA GAZETO ESPERANTISTA.



Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

ĜIS LA REVIDO !

Dans quelques jours, M. le Commandant Lemaire s'embarquera pour un nouveau voyage dans le « Continent Noir ». Nos vœux de succès et de bonheur le suivent et, dès avant son départ, viennent sur nos lèvres le salut d'amis dévoués et le cri d'espérance : Ĝis la revido !

Depuis un an notre vaillant collaborateur s'est dépensé en une propagande large, active et fructueuse. Nous l'avons vu, travailleur infatigable, mener une campagne qui nous conduirait rapidement au succès si elle était dirigée avec la même vigueur simultanément dans tous les pays. Conférences publiques, causeries particulières, réunions de toutes espèces, articles nombreux et documentés dans quantité de grands quotidiens, tel est le bilan admirable de cette activité débordante pendant l'espace d'une année. Il a touché tous les rangs de la société, toutes les catégories de cercles, depuis la puissante Chambre de commerce de notre capitale jusqu'à la Ligue féministe du droit des femmes et l'Université populaire.

C'est d'un puissant exemple pour nous, ses fidèles partisans, et nous souhaitons que chacun, entraîné par ce labeur intelligent, dévoué et incessant, ne laisse pas perdre le fruit de cette propagande : la récolte sera belle, si nous sommes les dignes continuateurs de l'œuvre de notre cher camarade, du président effectif de la Ligue espérantiste belge.

Bon voyage, cher Commandant, bonne santé, plein succès dans votre nouvelle mission, et au revoir ! au revoir !

LA RÉDACTION.

Post kelkaj tagoj, S^{ro} Komandanto Lemaire enŝipiĝos por nova vojaĝo al la « Kontinento Nigra ». Niaj bondeziroj pri sukceso kaj feliĉeco akompanas lin kaj, eĉ antaŭ lia forveturo, alflugas sur niaj lipoj saluto de sindonaj amikoj kaj la esperplena krio : Ĝis la revido !

De unu jaro, nia energia kunlaboranto klopodis kiel eble plej por propagando larĝa, agplena kaj fruktodona. Ni vidis lin, nelaceblan aganton, entrepreni bataladon kiu alproksimigus nin rapidege al la sukceso, se ĉiulande ĝi estus kondukata samtempe per simila energia virforteco. Publikaj paroladoj, privataj konversacioj, ĉiuspecaj kunvenoj, multnombraj kaj dokumentriĉaj artikoloj en diversaj gravaj ĵurnaloj, jen estas la mirinda rezultato de tiu neordinara agemeco dum nura jaro.

Li turnis sin al ĉiuj rangoj de l' societo, al ĉiuj kategorioj de kluboj, komencinte ĉe la potenca Komerca ĉambro de nia ĉefurbo por fini ĉe la Feminista ligo de l' rajtoj por la virinaro kaj la Popola universitato.

Estas tre grava ekzemplo por ni, liaj fidelaj samideanoj, kaj ni varme esperas ke, allogita de tiu inteligenta, sindona kaj neĉesanta laborado, ĉiu el ni ne permesos ke pereos la frukto de tiu propagando : belega estos la rikolto kondiĉe ke ni estu indaj daŭrigintoj de l' penado de nia kamarado, de l' agema prezidanto de la Belga Ligo esperantista.

Bonan vojaĝon, kara Komandanto, bonan sanon, plenan sukceson en via nova entrepreno kaj ĝis la revido ! ĝis la revido !

LA REDAKCIO.

NOVA JARO.

Kvankam tiu ĉi numero de la Belga Sonorilo estas la dua kiu eliras de la 1^a Januaro, niaj gelegautoj pardonos certe al ni la malfruan prezenton de nia tutkora kaj tre sincera bondeziro por la ĵus komencita jaro. Nepre ni deziras ke Esperanto pli kaj pli altiĝu, kresku kaj disvastiĝu por fine ricevi entusiasman akcepton de ĉiuj kleraj homoj.

Grava ŝanĝo okazis en la redakcio de la ĵurnalo, tial ni ne povis plenumi nian jaran devon kontraŭ niaj fidelaj abonantoj. Hodiaŭ, ĉar ni antaŭeniras kun nova espero, ni klarigos la kelkajn ŝanĝojn, kiujn la nova redakcio decidis pri nia Belga ĵurnalo.

Sed antaŭ ĉio, ni devas tutkore danki niajn amikojn M. Seynaeve kaj J. Coox por la sindoneco kiun ambaŭ ili ne ŝparis de la tago kiam ili akceptis direkti nian organon. Unu el ili, D^{ro} Seynaeve, estas devigata forlasi partesian esperantan laboron, tamen kiel membro de la redakcio, li promesis daŭrigi sian ŝatindan kunlaboron, kaj ni esperas ke, tre ofte, ni havos okazon por voki lian servemon. Pri S^{ro} J. Coox, li akceptis daŭrigi lian administracian agadon kaj estas al li ke ĉiuj esperantistoj, abonantoj aŭ ne, devas sin turni pri la kasista departemento, kiun li zorge direktis ĝis nun. Dum la antaŭaj monatoj, S^{ro} J. Coox, pro neceso, prenis sur si la tutan ŝarĝon de la direkto, kaj malgraŭ tiu aldono de laboro, li konservis la intereson kaj la regulecon kiujn ni kutimis ricevi de nia kara ĵurnalo.

Kiel oni jam scias, nia nova direktoro estos Kom^{to} Lemaire kiu, eĉ malproksime de ni, gvidos nin, rekuraĝigos nin se estus necesa — tio ne okazos, ni esperu — kaj kunlaborados regule per sendo de leteroj nepacience atenditaj de Afriko. S^{ro} Jos. Jamiu anstataŭigos lin kaj la bonekonataj redaktoroj Amatus, Vieilhomme, Luc. Blaujean k. c. daŭrigos ilian kunlaboradon.

Tamen tio ne sufiĉos por regule eldoni la ĵurnalon. Ni alvokas helpon de ĉiuj Belgaj Grupoj kaj precipe de la Ligaj grupoj, kiuj havos en niaj

NOUVEL AN.

Quoique ce numéro ci de la Belga Sonorilo soit le second qui paraisse depuis le premier janvier, nos lecteurs et lectrices nous pardonneront certainement la présentation tardive de nos cordiaux et très sincères souhaits pour l'année qui se commence. Avant tout nous souhaitons que l'Esperanto s'élève de plus en plus, croisse et se propage pour finalement recevoir un accueil enthousiaste de tous les gens éclairés.

Un important changement s'est produit dans la rédaction du Journal, c'est pourquoi nous n'avons pu accomplir notre devoir annuel vis-à-vis de nos fidèles abonnés. Aujourd'hui, puisque nous avançons avec un nouvel espoir, nous donnerons quelques éclaircissements sur les changements que la nouvelle rédaction a décidé de faire à notre journal belge.

Mais tout d'abord, nous devons cordialement remercier nos amis M. Seynaeve et J. Coox pour le dévouement qu'ils n'ont pas épargné lorsqu'ils ont accepté de diriger notre organe. L'un d'eux, le D^r Seynaeve, est obligé d'abandonner en partie son labeur espérantiste, cependant comme membre de la rédaction, il nous a promis de continuer son bon concours et nous espérons que fort souvent nous aurons l'occasion de faire appel à sa serviabilité. Quant à M^r J. Coox, il a accepté de continuer sa collaboration et c'est à lui que tous les espérantistes, abonnés ou non, doivent s'adresser pour le côté financier qu'il a soigneusement dirigé jusqu'ici.

Pendant les derniers mois, M^r J. Coox, par nécessité, a dû prendre toute la charge de la direction, et malgré ce surcroît de travail, il a su conserver l'intérêt et la régularité que nous avons été accoutumés à recevoir de notre cher journal.

Comme on le sait déjà, notre nouveau directeur sera le commandant Ch. Lemaire qui, même éloigné de nous, nous guidera, nous rendra courage si c'était nécessaire — cela n'arrivera pas, espérons-le — et collaborera régulièrement par l'envoi de lettres d'Afrique, impatiemment attendues. M. Jos. Jamin le remplacera et les rédacteurs bien connus Amatus, Vieilhomme, Luc. Blaujean etc. continueront leur collaboration.

Cependant cela ne suffira pas pour faire paraître réguliè-

EEN NIEUW JAAR.

Hoewel dit nummer der Belga Sonorilo reeds het tweede is, hetwelk sedert den 1^o Januari verschijnt, zullen onze lezers en lezeressen ons gaarne wegens het laattijdig aanbieden onzer rechtzinnige wenschen voor het pas begonnen jaar verontschuldigen. Voorzeker wenschen wij, dat het Esperanto zich meer en meer verheffe, dat het groeie en zich atom verspreide om ten slotte een geestdriftig onthaal te genieten bij alle verstandige lieden.

Een ernstige verandering heeft zich in de redactie van dit tijdschrift voorgedaan, om die reden konden wij niet verder onzen jaartijkschen plicht bij onze getrouwe abonneenten vervullen. Wij gaan met nieuwe hoop vooruit en zullen thans de verschillende veranderingen doen kennen, die de nieuwe opstelraad der Belga Sonorilo besloten heeft.

Doch vóór alles moeten wij van ganscher harte de heeren M. Seynaeve en J. Coox bedanken voor de toewijding, die zij zoo mild verleend hebben gedurende den tijd, waarop zij de leiding van ons blad hebben aangenomen. Een hunner, D^r Seynaeve, werd genoodzaakt gedeeltelijk zijne medewerking aan het Esperanto op te geven, hoewel hij als lid van den opstelraad beloofd heeft zijn hooggeschalte medehulp te blijven verleen; wij hopen dat het ons zeer dikwijls zal vergund wezen zijne bereidwilligheid te mogen benuttigen. Wat den heer J. Coox betreft, deze heeft aangenomen zijne werkzaamheden als beheerder voort te zetten en het is tot hem dat al de Esperantisten, abonneenten of niet, zich moeten wenden voor al de aangelegenheden van aard, die hij tot nu zoo wel heeft verzorgd. Gedurende de laatste maanden nam de heer Coox uit oorzaak van noodzakelijkheid den ganschen last van het bestuur op zich en niettegenstaande deze vermeerdering van werk wist hij de belangen van ons blad te verzekeren, en de regelmatigheid die wij gewoon zijn waar te nemen.

Zoodaals men reeds weet zal de heer Kommandant Lemaire onze nieuwe bestuurder wezen; hoewel verre van ons zal hij ons leiden en zoo noodig, nieuwen moed schenken. — hopen wij dat zulks niet moete gebeuren — en regelmatig medewerken door de toezending van brieven, die wij met ongeduld uit Afrika zullen vernachten. De heer Jos. Jamin zal hem vervangen en de welbekende medooptellers Amatus, Vieilhomme, Luc. Blaujean en anderen zullen hunne medewerking blijven verleen.

Dit alles is evenwel niet voldoende om regelmatige uitgave van

presitaj kolonoj, apartan lokon, kaj de kiuj ni atendas longan kaj profitan kutiman kunlaboradon.

Eĉ ni vokas ankoraŭ helpon de ĉiuj Esperantistoj el Belgujo kaj ankaŭ el alilandoj, la unuaj por doni al ni la lokajn sciigojn kiuj povus interesi la esperantistan mondon, la aliaj por ricevi de la plej malproksimaj regionoj, esperantistajn sciigojn aŭ literaturan montron de la internacieco de la lingvo.

La tro granda alfluo da sciigoj ne timigas nin, pli bone ni rogas de ĉiu la helpon kiu estas al ni necesa por prosperigi la novan aliformiĝon de la Belga Sonorilo.

La abonprezo estas altigita ĝis 6 frankoj jare, tamen niaj ĝis nun abonantoj ricevos la ĵurnalon, sen plia pago, ĝis la fino de la aŭgusta monato.

LA REDAKCIO.

ment le journal. Nous demandons l'aide de tous les groupes belges et principalement des groupes ligués, lesquels auront dans nos colonnes une place réservée et de qui nous attendons un concours suivi et profitable. Même nous demandons encore l'aide de tous les Espérantistes de Belgique et aussi de l'étranger, les premiers pour nous donner les informations locales qui peuvent intéresser le monde espérantiste, les autres pour recevoir des régions les plus lointaines, des nouvelles espérantistes ou des exemples littéraires de l'internationalité de la langue.

La trop grande affluence de documentation ne nous effraie pas, bien mieux nous demandons à chacun l'aide qui nous est nécessaire pour faire prospérer la nouvelle transformation de la Belga Sonorilo.

L'abonnement est porté à 6 francs par an, cependant les abonnés ayant déjà payé, recevront le journal, sans supplément de prix, jusque fin août.

LA RÉDACTION.

ons blad te verzekeren. Wij doen eenen oproep tot alle Belgische groepen, vooral van die welke bij den Bond aangesloten zijn; aan deze laatste wordt een afzonderlijke plaats in onze kolommen voorbehouden. Wij verwachten van hen een aanzienlijke en degelijke regelmatige medewerking.

Wij verlangen ook die van alle Belgische en buitenlandse Esperantisten, de eenen om ons de plaatselijke inlichtingen te bezorgen van aard om de belangstelling der esperantische wereld op te wekken, de anderen om uit de verwijderde streken inlichtingen in te winnen of literarische bijdragen, ten teeken der internationaliteit onzer taal.

De te groote toevloed van bijdragen schrikt ons niet af, wij verzoeken integendeel van eenieder de ons noodige hulp om de nieuwe vormverandering der Belga Sonorilo te doen gedijen.

De jaarlijksche inschrijvingsprijs wordt tot op 6 frank verhoogd; evenwel zullen de legemoordige abonneenten zonder opleggeld het blad blijven ontvangen tot op het einde der maand Augusti.

DE REDACTIE.

KRONIKO DE LA GRUPOJ.

Uit Antwerpen.

De « Antverpena Grupo Esperanta » neemt in bloei toe, terwijl zij moedig ijvert voor het verspreiden van 't Esperanto. Niet alleen behalen de leergangen een volledigen bijval, maar de wekelijksche vergaderingen voor samenspraken en volmaking brengen telkens menige ijverige leden bijeen.

De belangrijkste van de reeds gehouden vergaderingen (wier dagorde regelmatig wordt afgekondigd in Antwerpsche nieuwsbladen was die van den 8^{sten} December.

Eerst deelde de voorzitter eenige inlichtingen mede nopens het tienjarig jubileum van M. Van Schoor als Esperantist, dat men dien dag viëren zou. Dan las hij een letterkundig artikel voor, waarin hij eenige « Feestgebruiken in België » beschreven had, die telkenjare gedurende November en December gevierd worden. Het boezemde den aanwezigen veel belangstelling in en zij wenschten van harte het weldra te lezen in de B. S.

Een groep uit Japan deelde mede, dat zij onlangs ontstaan was en wenschte een Internationaal Esperantistenkongres in te richten binnen zes jaar, wanneer eene Wereldtentoonstelling in Tokio zal plaats grijpen.

Uit Indië verzoekt men zaken met Esperanto in betrekking te zenden voor eene eerlang te houden tentoonstelling.

Heer Lemaire verzoekt de afgevaardigden van de Antwerpsche groep in de eerstvolgende vergadering van de Komiteitsleden der « Belga Ligo » een voorstel te doen nopens het getuigschrift van be-

El Antverpeno.

La « Antverpena Grupo Esperantista » progredas, kuraĝe klopodante por la disvastigo de Esperanto. Ne nur ĝiaj kursoj rikoltas plenan sukceson, sed ĝiaj ĉiusemajnaj interparoladoj kaj perfektigaj kunvenoj regule kunigas grupon de fervoraj membroj.

La plej interesa el la ĝis nun okazintaj kunsidoj (kies tagordoj estis publikigitaj en antverpenaj ĵurnaloj) estas tiu de la 8^a de Decembro.

Unue la prezidanto komunikis kelkajn sciigojn pri la dekjara Esperantista jubileo de S^o Van Schoor kiun oni festos tiun tagon. Li poste legis literaturan artikolon en kiu li estis priskribinta kelkajn « Festkutimojn » ĉiujare festatajn en Belglando dum Novembro kaj Decembro. Ĝi interesigis la ĉeestantojn, kiuj korege esperas baldaŭ legi ĝin en la B. S.

Japana Grupo sciigis nin ke ĝi naskiĝis antaŭ nelonge kaj ke ĝi deziras organizi Internacian Esperantistan Kongreson en Tokio post ses jaroj kiam Internacia Ekspozicio tie okazos.

El Hindujo oni petas sendi Esperantaĵojn por la baldaŭ okazonta Esperanta Ekspozicio.

Sinjoro K^o Lemaire petis la delegontoj de la Antverpena Grupo fari en la venonta kunveno de la Ligkomitatanoj la priskribitan proponon pri la

kwaamheid voor het onderwijs van Esperanto, waarover de groep hem geschreven had.

Nadat de aanwezigen eenige wetenswaardige inlichtingen medegedeeld hadden, wenschte de voorzitter den heer Van Schoor, onzen ondervoorzitter, geluk, die ondertusschen binnen gekomen was. Hij benuttigde deze gelegenheid om in oogenschouw te nemen hetgene onze ondervoorzitter reeds gedaan had voor Esperanto.

Daarom herinnerde hij hoe op 't oogenblik, dat Volapuk mislukte, de feesteling, die Esperanto had beginnen te leeren, aanhangers trachtte aan te werven tusschen zijne vrienden en bekenden. De onverschilligheid en de spot deden hem niet aarzelen, hij hield zijn onvermoeibare propaganda moedig vol: voordrachten gevende, artikels afkondigende in letterkundige, wetenschappelijke tijdschriften en in dagbladen, de taal aanleerende aan anderen, en brieven wisselende in 't Esperanto.

Als de A. G. E. ontstond, was hij onder de medestichters. De medeleden waardeeren zijne onvermoeibare toegenegenheid en danken hem van ganscher harte voor de hulp geschonken aan onze belangrijke zaak.

De heer D^r Broeckeaert noemde den heer Van Schoor een toonbeeld van vooruitgangslievend mensch, de hoedanigheden van een ijverig propagandist bezittende, wenschte hem eveneens geluk en schonk hem in den naam van de leden, die wekelijks deelnemen aan de zittingen van samenspraken en volmaking een schoon lederen papirtesch, bevattend een zinnebeeldige bladzijde kunstig geteekend door den voorzitter en de handteekens van de inschrijvers.

De heeren Horowitz en Van der Biest-Andelhof stuurden op hunne beurt hartelijke gelukwenschen toe aan den held van het feest, die de deelnemers welgemeend bedankte.

In zijn n^o van den 16^{en} Dec. heeft « Le Matin » zeer wel de tegenwerpingen weerlegd, die « La Gazette » eenige dagen tevoren tegen Esperanto gemaakt had.

Heer Lemmers, onderwijzer bij de Lagere Hoofdschool, zal weldra eenen leergang van Esperanto beginnen, die des Zondags zal gegeven worden in de Nijverheidsschool aan de leden van kring « Diesterweg ».

ADOLF.

Bruges. — Le groupe espérantiste de cette ville est en pleine activité.

Chaque semaine trois cours d'Espéranto y sont donnés par M. A.-J. Witteryck, président du groupe: en flamand, le mercredi à 5 1/2 h., en français, le mercredi à 8 h., et en anglais, le vendredi à 5 1/2 h. Ces trois cours sont suivis très régulièrement par une centaine de membres.

À l'assemblée générale préparatoire qui se tint le 21 novembre dernier au local du Groupe (l'Aigle d'Or, place de la Monnaie), M. A.-J. Witteryck entretint son auditoire nombreux et choisi, de la langue universelle et de son mécanisme. Le 17 décembre, il fit la même conférence, en flamand, aux membres du Syndicat du Commerce et de l'Industrie.

kapebleca atesto por la instruado de Esperanto.

Kiam la ĉeestantoj estis farintaj kelkajn sciigindaĵojn, la prezidanto gratulis S^{on} Van Schoor, nian vicprezidanton kiu intertempe estis enirinta, li uzis tiun okazon por aŭrigardi la de nia vicprezidanto faritan laboron por Esperanto.

Tial li rememoras kiel de la momento kiam Volapuk malsukcesis kaj la festato eklernis Esperanton, provis varbi adeptojn inter siaj amikoj kaj konatuloj. La indiferenteco kaj la mokado ne ŝanceligis lin, li kuraĝe persistis en sia nelacebla propagando farante paroladojn, publikigante artikolojn en literaturajn aŭ sciencajn revuojn kaj ĉiutagajn ĵurnalojn, instruante la lingvon, korespondante esperante.

Kiam la Antverpena Grupo Esperantista naskiĝis li estis inter la kunfondintoj. La grupanoj ŝatas sian nelaceblan sindonemon kaj tulkore dankas lin pro la helpo donita al nia grava afero.

S^o D^o Broeckeaert nomis S^{on} Van Schoor, modelon de progresemla posedanta la kvalitojn de fervora propagandisto. Kiam li ankoraŭ estis gratulinta lin, li donas al li je la nomo de la membroj kiuj ĉiusabate partoprenas al la interparoladoj, belegan ledan paperujon enhavantan arte alegorie desegnititan paĝon de nia prezidanto, kaj la subskribon de la donacantoj.

S^o Horowitz kaj Van der Biest-Andelhof tulkore siavice gratulis la heroon de la festato kiu sincere dankis la partoprenantojn.

En sia numero de la 16^a de Decembro « Le Matin » bonege refutis la du riproĉojn kiujn « La Gazette » estis farintaj kontraŭ Esperanto kelkaj tagoj antaŭe.

S^o Lemmers, membro de la grupo, instruisto ĉe la supra unuagrada lernejo baldaŭ komencos kurson de Esperanto, kiu okazos dimanĉe en la « Industria Lernejo » por la membroj de la Societo: « Diesterweg ».

ADOLFO.

Brugo. — La Grupo esperantista de tiu urbo estas en plena agado —

Ĉiu semajno estas tie donataj tri kursoj de S^o A.-J. Witteryck, prezidanto de l' Grupo: *flandra*, merkrede je la 5 1/2^a, *franca*, merkrede je la 8^a kaj *angla*, vendrede je la 5 1/2^a — Tiuj tri kursoj kunvenigas tre regule centon da ĉeestantoj.

Ĉe la ĝenerala kunveno kiu okazis la 21^a de novembro lasta, en la kunveno de l' Grupo (Aigle d'Or, Place de la Monnaie), S^o A.-J. Witteryck paroladis al sia multa kaj elektata aŭdantaro, pri la universala lingvo kaj ĝia mekanismo. La 17^a de decembro, li donis la saman paroladon, flandre, al la membroj de Syndicat du Commerce et de l'Industrie, (sindikato por komerco kaj industrio).

Ce regain de vie donné au *Bruga Grupo Esperantista*, a débuté comme on le sait, par la brillante conférence que vint donner le Com^e Lemaire le 15 novembre dernier; 500 personnes assistaient à cette conférence. Monsieur le baron Bethune, Gouverneur de la province présidait, ce fut de la part de cet homme éminent qui occupe une place en vue dans le monde de la science, une nouvelle preuve du grand intérêt qu'il porte à tous les progrès en général et à l'Espéranto en particulier. Nous lui en exprimons ici toute notre reconnaissance.

Remercions aussi d'une façon toute spéciale les *journalaux Brugeois* qui mettent gracieusement leurs colonnes au service du mouvement Espérantiste: *Burgerwelzijn*, etc.

Bruxelles. — Ni anoncas kun plezuro la tre baldaŭan fondon de brusela esperantista grupo, ekstere la sekcio de la multlingva klubo. Tiu decido energie prenis kelkaj fervoraj samideanoj. — Ĝenerala kunsido de ĉiuj bruselaj kaj antaŭurbaj esperantistoj okazos baldaŭ, kie oni alprenos la regularon, kaj formas la komitaton.

Ni estas tre feliĉaj pri tiu bonega ideo, ĉar la ĉefurbo de Belgujo, kiu kalkulas tre multajn aĵojn al nia kaŭzo, havis ĝis nun nenian grupon memstarantan, kaj konante la fervoron de kelkaj el niaj amikoj, ni ne dubas ke ĝi estos unu el la plej agemaj kaj kuraĝaj de la lando.

Ni esperu ke tiu « kerno » fariĝos baldaŭ « neĝabulo ».

En la poliglota klubo, la sabataj kaj laudaj kursoj estis rekomencitaj kaj ĉiam sekvataj diligente de multaj lernantoj.

Nova grupo kaj kurso je la popula universitato de S^t Josse-ten-Noode estas formitaj.

Aliaj kursoj estos organizitaj kaj prosperas en Laeken, grupo « La semanto »; en S^t Gilles, ĉe la societo « Le Foyer Intellectuel » kaj ĉe la « Fédération post-scolaire », en Bruselo ankaŭ ĉe la « Ligue du droit des femmes ».

Dank' al la klopodoj de S^o Errera, la Esperanta kurso de la poliglota klubo okazos en la loko mem de la Universitato de Bruselo (Université libre, rue de l'Impératrice).

La nova kurso komencos la 4^a de februaro. La kotizaĵo estas minima, eble 2 frankoj.

La ĵurnalo « L'Indépendance Belge » publikigis serion da tre gravaj artikoloj pri la demando de Helpanta lingvo verkitaj de Kom^{to} Lemaire. La Belga Sonorilo intencas reprodukti kaj traduki tiujn artikolojn.

La 22^a de januaro, la « Angla Sekcio » de la Poliglota klubo organizas anglan paroladon de Rev^d Father Austin Richardson, unu el niaj bonaj propagandantoj. La subjekto de tiu parolado estos:

Is an International language possible? Tiu temo donos al la simpatia parolanto okazon prezenti Esperanton. Ĉiuj geesperantistoj povos ĉeesti al tiu montro kiu certe estas kurioze atendita de la Angla kolonio en Bruselo. Hotel Ravenstein, je la 8 1/2 horo vespere.

Tiu viva agado de la B. G. E. ekkomencis, kiel oni ĝin scias per bonega parolado kiun S^o Kom^{to} Lemaire, donis la 15^a de novembro, 500 personoj alestis, S^o B^{no} de Bethune, provinca reganto prezidis; tiu Eminentulo kiu estas tre ŝatata inter la scienculoj donis tiel novan provon de la granda intereso kiun li aljuĝas al ĝeneralaj propagandoj kaj precipe al Esperanto. Ni esprimas tie ĉi nian tutan dankecon.

Ni danku ankaŭ speciale la bruĝajn ĵurnalojn kiuj malfermas iliajn kolonojn por la Esp. propagando: *Burgerwelzijn*, *Gazette van Brugge*, *Handelsblad*, *Stad Brugge*, *'t Vrije Woord*, *Berichtenblad*, *Noord en Zuid*, *La Patrie*, *le Journal de Bruges*, *le Réveil des Flandres*.

Virton. — S^o Luc. Blanjean faris sukcese paroladon en Arlon la 13^a de Januaro pri kiu ni raportos pli longe en nia venonta numero; jam de la 16^a de Decembro, kunveno okazis en Virton al kiu alestis kvardeko da aŭdantoj; S^o Lesquoy intencas organizi kurson, la propagando bone komencas.

Liège. — Tiu ĉi jaro la grupo organizis du kursojn kiuj okazas en la lokoj de la Universitato.

Ĉiusabate, je la 8^a horo vespere, kurso por la viroj, profesoro S^o de Troyer.

Ĉiujauĉe, je la 5^a horo, posttagmeze, kurso por la virinoj, profesoro S^o Sloutzky.

Verviers. — La Esperantista societo organizos baldaŭ grandan feston de propagando.

La kursoj sukcese daŭrigas.

Namur. — La Esperantista grupo de la garnizono, organizita de la kapitano Bismar de la 13^a linia regimento kalkulas de nun pli ol dudek membrojn. Ĉiuj oficiroj povas enskribiĝi en tia grupo. La kolonelo Avaert, regimentestro de la 13^a regimento akceptis la honoran prezidon.

HORO DE MORTO.

Kvankam morto malvarma kutimas elstreĉi
Siajn manojn kruele,

Lasi mondon ĉi tiun, mallumon eniri —
Ne timigas tiele!

Devas veni ja fino al ĉio vivanta,
Al batado de koroj...

Enuigas nin fine la ŝanĝo konstanta
De la ridoj kaj ploroj.

Sed forlasi karulojn en horo de morto
Al kruela la sorto

Kaj en tombon subiri, aŭdante la ploron —
Nur ĝi faras doloron!

Leo Belmont.

BELGA LIGO ESPERANTISTA.

KASKALKULO 1905-1906.

ENSPEZOJ

Ordinaraj ĉiamaj membroj . . .	2	50 00
Ordinaraj unujaraj membroj . . .	128	137 00
Protektantaj unujaraj membroj . . .	12	95 00
Komandanto Ch. Lemaire . . .	1	300 00
Vendo de broŝuroj		5 00
Grupo da virinoj, Antverpeno		5 50
Ricevita por la periodo 1906-1907.		
Ordinaraj unujaraj membroj . . .		14 00
Protektantaj unujaraj »		5 00
Sume	143	611 50
Membroj de la Ligaj Grupoj 1905-1906.		
Grupo el Antverpeno	164	
» Duffel	19	
» Huy	41	
» Liège	25	
» Verviers	37	
Efektiva nombro de la Liganoj je la 31 ^a Aŭgusto 1906.	429	
Kopio certigita, Duffel, la 25 ^a Decembro 1906. La Administracia Kasisto, J. COOX. Aprobata dum ĝenerala kunsido de la Belga Ligo Esperantista. Bruselo, la 30 ^a Decembro 1906. La ĝenerala Sekretario, JOS. JAMIN. La Prezidanto, K ^{to} CH. LEMAIRE.		

ELSPEZOJ

Materialo (sigelilo, oficaj mebloj, paperaĵoj, k. c.)		99 90
Por korespondado: poŝtsignoj, poŝtkartoj, k. c.		62 56
Oficaj liveraĵoj		39 25
Pagita abono al La Belga Sonorilo . . .		5 00
Diversaj		8 00
Kurso en Kortrejko		25 00
Al nia presisto Witteryck, broŝuroj propagandaj		177 60
Al Ĉefeĉ, propagandiloj		31 50
Propagandaj folioj		56 50
Cirkuleroj pri fondo de la Ligo		22 70
Restaĵo		83 49
Sume		611 50
POSEDO.		
Kaso		83 49
Propagandaj folioj . . . 7000‰ 5.65		39 55
Ŝlosiloj Ĉefeĉ 500‰ 3.50		17 50
Broŝuretoj «La Langue» 200‰ 7.00		14 00
» «L'Esperanto» 600‰ 5.60		33 60
Regularoj de la Ligo . . . 200‰ 4.00		8 00
Kartaroj 60 0.20		12 00
Oficaj liveraĵoj		18 00
Diversaj ŝuldantoj		8 00
Sume		234 14
DEBITO.		
Pagitaj kotizaĵoj por 1906-1907		19 00
Propre		215 14

Le Président de la Ligue a reçu la lettre suivante :

Anvers, le 8 janvier 1907.

Cher Président,

Lors de votre dernière conférence en notre Institut de Commerce, bon nombre d'Espérantistes se sont réjouis de votre projet concernant quelques leçons d'Espéranto à donner aux étudiants.

Sans doute, par suite de votre prochain départ, le projet tel quel doit être abandonné ; mais il serait peut être possible de le transformer avantageusement. En attendant une intervention officielle en faveur de l'enseignement public de la seule langue internationale de l'avenir, les étudiants ne pourraient-ils se grouper, et fonder un

CERCLE DES
Etudiants Espérantistes.

de l'Institut supérieur de Commerce d'Anvers.

Vu le grand nombre d'étudiants étrangers (environ 200 sur 300 inscriptions) qui passent annuellement par notre Institut ce serait là un moyen de propagande utile ; en effet, après les 2 ou 3 années d'études, tous se sépareront et rentreront dans

La Prezidanto de la Ligo ricevis la sekvantan leteron :

Antverpeno, la 8^a de Januaro 1907.

Kara Prezidanto,

Kiam vi paroladis ĉe nia Instituto de Komercio, kelka nombro da Esperantistoj ĝojigis pri via projekto rilate al kelkaj lecionoj pri Esperanto por la studentoj.

Eble, ĉar via baldaŭa eliro malhelpas kaj ni devos forlasi tiun projekton ; tamen estus ebla utile aliformigi ĝin. Atendante oficialan intermeton por la publika instruado de la sola internacia lingvo de l'estonteco, ĉu la studentoj ne povus grupiĝi kaj fondi.

KLUBO DE LA
Esperantistaj Studentoj.

de la Supera Instituto de Komercio en Antverpeno

Granda nombro da alilandaj studentoj (ĉirkaŭ 200 el 300 enskribitaj) jare lernas en nia Instituto kaj formigus « Kernon » por utila propagando ; efektive post 2 aŭ 3 jaroj de lernado, ĉiuj disiĝos kaj reiros en sia patrolando kie ili povos fondi

leur patrie où ils pourront développer de nouveaux centres actifs. Quant aux Belges, ou bien ils retourneront en province pour y continuer la vulgarisation déjà commencée, ou bien ils partiront également vers d'autres pays pour y devenir des agents de propagande plus importante encore.

L'agent principal et indispensable de cette multiplication sera le professeur, l'Espérantiste dévoué qui permettra la formation d'un cercle d'étudiants utile, l'homme enfin qui voudra bien pousser la générosité jusqu'à initier de nombreux jeunes gens à une langue destinée à devenir beaucoup plus utile au point de vue international que l'ensemble des 10 autres langues que l'on s'efforce actuellement, souvent en vain, à leur apprendre.

Or, le professeur nous manque !

Comme vous serez le promoteur de l'idée initiale, c'est à vous, cher Président, que s'adresse un jeune étudiant pour le mettre en rapport avec le professeur nécessaire, parce que vous êtes seul à même de désigner votre remplaçant.

Attendant une réponse favorable, je vous remercie pour vos bontés à l'égard du monde étudiantin, et vous prie de recevoir mes salutations respectueuses.

LEOPOLD MOELANTS,
étudiant à l'Institut de Commerce,
Rue des Peintres, 51,
Anvers.

Note du Secrétaire. — Notre président a répondu personnellement à M. Moelants, afin qu'il s'adresse à notre groupe si actif d'Anvers.

novajn agemajn centrojn. Pri la Belgoj, ĉu ili reiros en provincoj por daŭrigi la jam komencitan vulgarigon, ĉu ili ankaŭ elmigros al aliaj landoj por fariĝi agentoj de ankoraŭ pli grava propagando.

La ĉefa kaj necesega ilo de tiu multigo estos le profesoro, la sindonema Esperantisto kiu helpos fondon de Klubo de Studentoj, unuvorte la homo kiu sinproponas por iniciatigi al multaj junuloj, lingvon difinitan por multe pli utili, je la internacia vidpunkto, ol la aro da 10 aliaj lingvoj, kiujn, ofte vane, oni instruas malfacile.

Nu, la profesoro mankas por ni !

Ĉar vi estos la iniciatoro de tia ideo, al vi kara Prezidanto, sin turnas juna studento por ke vi bonvole konatigu al li la nepre necesan profesoron ĉar vi estas difinita por elekti vian anstataŭulon.

Atendante favoran respondon, mi dankas vin por via afableco kontraŭ la studenta mondo kaj prezentas al vi, mian respektplenan saluton.

LEOPOLD MOELANTS,
Studento ĉe la Komercia Instituto,
rue des Peintres, 51,
Anverpeno.

Nota de la Sekretario. Nia prezidanto respondis persone al S. Moelants por ke li sin turnu al nia agema grupo en Antverpeno.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

Triliniaj Novaĵoj.

Esperantajn dokumentojn por la Ekspozicio Internacia Stenografia en Szeged, 1907, oni sendu al S^{ro} Z. Baranyai, Szeged, III. Ker. polg.

La 13^a de Januaro okazos en amfiteatro Richelieu, ĉe la Sorbonne, Parizo, disdonon de la premioj al la lernantoj de la kursoj de la Pariza Grupo.

El Madagascaro Insulo, oni anoncas fondon de la Esperantista Grupo de Tananarive, prezidanto Kapitano Fortin.

Ni deziras baldaŭan resanigon al nia sindonema samideano, J. Borel, el Berlino, kiu ne povas plu labori por nia afero, pro malsano.

La loka Komitato por la Kongreso en Cambridge elektis titolon : « La Trio por la Tria », kaj devizon : « Havu fidon, helpu kaj venu ! »

La Bohemaj Esperantistoj baldaŭ havos sian ĵurnalon. La Esperanta Klubo en Praha tion decidis. Redaktoro S^{ro} Ed. Kühnl. Abono 3.75 fr.

La « Mergenthaler Linotype Company » el New York, liveras la ĉapelitajn literojn por siaj maŝinoj al la ĉiutagaj ĵurnaloj Amerikaj.

La Komercakademio el Hamburg (Germanlando) komencis novan kurson ; tiu instituto havas jam tri instruistojn.

Nova grupo fondiĝis en Berlino. Celo : helpo por profitoj al ĉiuj membroj, biblioteko, k. c. adreso : Internacia Klubo de l'Esperantistoj, Berlin N. W. 52 Lüneburgerstr. 30^{III}.

La Socialista Societo « De Werker » el Antverpeno proponis paroladon pri Esperanto, al unu el nia plej fervoraj samideanoj, kiu akceptis.

El insulo Malte oni sciigas ke tie estas ĉirkaŭ 500 adeptoj. Konsuloj : D^{ro} G. Busutill, 1, Šbies, Misida Malto, kaj V. A. Colombo, 16-17 Marina Valleta, Malto.

Kelkaj amikoj demandis nin pri la grupoj fotografitaj en Genevo dum la Kongreso, kiujn ili mendis ? Nenian respondon ni povas fari.

El Stuttgart, oni anoncas fondon de « Internacia Korespondanta Societo » (I. K. S.) pri internaciaj rilatoj. Adreso : Kasernenstr, 20, Stuttgart (Germanlando).

Oni organizas ankaŭ Internacian Societon de l'Esperantistaj Juristoj. Ĝenerala Sekretario : S^{ro} Sergeant, 31, Bulvarde Mariette, Boulogne s. M. (France).

La « Franca Gramatiko » de S^{ro} P. Boulet, kun antaŭparolo de rektoro E. Boirac, estos proksime disdonita al la subskribantoj.

Grupo da Komerciaj oficistoj fondis la Klubon Esperantisto « Merkurio » en Rotterdam. La Sekretario estas : S^{ro} Bakker, Hoogstr. 218, Rotterdam (Holando).

Nia sindonema samideano Rosa Junck faris kursojn en Milano kaj de nun, fondo de la Milana grupo estas certa. Ni gratulas ŝin.

La organizantoj de la Ekspozicio de Jamestown (U. S. A.) intencas daŭrigi la proksiman kongreson de Cambridge en Norfolk dum la fino de Aŭgusto.

Niaj anglaj amikoj jam rikoltis sumon da 22500 frankoj por pagi la elspezojn de la venonta kongreso ! Ni gratulas la Trion....

Oni intencas aranĝi specialan kongreson de blinduloj en Cambridge, kaj oni kalkulas ke ili estos sufiĉe nombraj kaj malsame naciaj por fari impreson.

D^{ro} Hanauer, el Frankfurt, skribis al Kom^{to} Ch. Lemaire kaj proponis al li tradukon en Germana lingvo de lia verko Tra Mez-Afriko.

MOZANO.

Vers la langue auxiliaire internationale. (1)

L'Indépendance belge a bien voulu m'ouvrir ses colonnes pour y tenir ses lecteurs au courant des progrès de l'Esperanto, solution triomphante du problème de la langue seconde, la même pour tous.

L'avant-garde qui a combattu ce bon combat, malgré sarcasmes et résistances, a vu s'allonger singulièrement la colonne des nouveaux combattants, et ce premier corps d'armée se réjouira de l'accueil que veut bien lui faire un des grands journaux belges si spécialement apprécié à l'étranger.

Pour moi, je m'efforcerais de montrer objectivement les caractéristiques de cet irritant problème de l'enseignement des langues étrangères, vivantes ou mortes; à ceux qui croient nous accabler en nous traitant d'« internationalistes », je répondrai que je ne les comprends pas; s'ils continuent à affirmer que l'Esperanto est la langue des « sans patrie » je leur dirai que je ne les comprends pas; aux autres je me contenterai de signaler qu'il est de bons internationalistes dont le but est de se mettre en rapport le plus possible avec les étrangers, pour leur emprunter ce qu'ils ont de bon et d'utile, et propager chez eux ce que nous avons nous-mêmes de bon et d'utile.

Je montrerai les applications déjà faites de l'Esperanto à l'amélioration du sort des aveugles; je signalerai l'importance de son application aux services de la Croix-Rouge sur les champs de bataille; je répéterai, après d'autres, que si la guerre est encore, malheureusement, un mal nécessaire, il est du devoir de tous les hommes qui ont le cœur à la bonne place d'en atténuer les horreurs, et que l'Esperanto a là, en vérité, un beau rôle à remplir et qu'il n'y faille certainement point. Je citerai, du général Bailloud, les graves paroles suivantes: « Au cours de la campagne de Chine, j'ai eu à commander une colonne mixte comprenant des contingents français, anglais, allemands, italiens. J'ai donc pu constater, par expérience, combien aurait été utile à tous une langue commune, qu'ils auraient pu apprendre à parler suffisamment pendant le temps qu'a duré le voyage du pays d'origine au point de débarquement. »

Je rappellerai peut-être les conversations plutôt peu brillantes au cours d'une réception franco-russe:

« Vive la France! monsieur! » disait de temps à autre, en français, un officier russe, avec un mauvais accent.

« Vive la Russie! » répondaient les Français, en mauvais russe, et c'était tout!

Le reste du temps se passait en mimiques grotesques et en libations nombreuses.

Je rappellerai aussi qu'en août 1905 — hier — à Portsmouth, les délégués russes et japonais discutaient les conditions de cessation de la boucherie mandchourienne. Ils employaient quatre langues: le russe, le français, l'anglais, le japonais. M. Witte utilisait tantôt le russe, tantôt le français, que M. Nabokoff traduisait en japonais à M. Komura;

(1) Extrait de « L'Indépendance Belge » 1^{er} octobre 1906.

Al la internacia helpanta lingvo. (1)

La ĵurnalo « L'Indépendance Belge » (La Belga Memstareco) bonvole min akceptis por ofte konatigi, al ĝiaj gelegantoj, la progresojn de Esperanto, triumfa solvo de la demando pri la dua lingvo, sama por ĉiuj.

La antaŭ-gvardio kiu batalis por tiu nobla celo, malgraŭ sarkasmoj kaj kontraŭbatoj, vidis malantaŭe pligrandigi senĉese la armeon kolonon de la novaj kunbatalantoj kaj tiu unua « Korpuso » ĝojigos pro la akcepto, kiun intence faris al ĝi unu el la gravaj belgaj ĵurnaloj, tiel speciale ŝatinda eksterlande.

Pri mi mem, mi penados montri reale la karakterizojn de tiu incitanta problemo pri la instruado de la fremdaj lingvoj, vivantaj aŭ mortintaj; al tiuj, kiuj kredas nin subpremigi, nomante nin « internaciistoj » mi respondos ke mi ne komprenas ilin; se ili daŭrus jesigi ke Esperanto estas la lingvo de la « senpatra-landuloj » al ili mi diros ke mi ne komprenas ilin; al la aliaj mi nur montre diros ke ekzistas bonaj internaciistoj de kiu celo estas rilatigi la plej eble kun alilanduloj por pruente preni de ili tion, kio estas bona kaj utila kaj propagandi inter ili tion, kion ni havas — ni mem — bonan kaj utilan.

Mi montros la aplikadojn jam faritaj per Esperanto por la plibonigo de sorto de la blinduloj; mi atentigos al la graveco de ĝia aplikado en la servoj de la Ruĝa-Kruco sur la batalkampoj; mi ripetos, post aliaj, ke se la milito estas ankoraŭ, bedaŭrinde, necesa malbono, la devo de ĉiuj homoj, kiuj havas la koron en « difinita loko », estas malpliigi ĝiajn terurojn kaj ke Esperanto havas, vere, belan rolon plenumotan kaj certe ĝi ne mankos. Mi citos la sekvantajn parolojn de la generalo Bailloud: « Dum la Sina militado, mi estis komandanta miksitajn rotaron enhavantan kontingentojn francan, anglan, germanan, italan. Mi do povis konstati, eksperimente, en kia grado estus utila por ĉiuj, komuna lingvo, kiun ili estus lernintaj, por sufiĉe bone paroli, dum la tempo necesa por la vojaĝo de la patrolando ĝis la havro de elŝipigo. »

Eble mi memoros la interparolojn, malmulte brilaj, dum franca-rusa ricevfesto:

« Vivu Francando! sinjoro! » rusa oficiro diris iafoje per franca lingvo mallerte akcentigita.

« Vivu Ruslando! » respondis la Francoj per malbona rusa lingvo, kaj nenio plu.

La cetera tempo pasigis dum interŝanĝis groteskaj pantomimoj aŭ multnombraj oferverŝoj.

Mi memoros ankoraŭ ke, dum aŭgusto 1905 — kvazaŭ hieraŭ — en Portsmouth, la rusaj kaj japanaj delegitoj diskutis la kondiĉojn pri haltigo de la Mandĉuria buĉado. Ili uzis kvar lingvojn: rusa, franca, angla kaj japana. S^{ro} Witte uzis jen rusa, jen franca lingvoj, kiujn S^{ro} Nabokoff tradukis japane al S^{ro} Komura; tiu ĉi respondis japane kaj la

(1) Traduko el ĵurnalo « L'Indépendance Belge » 1^a de Oktobro 1906.

ce dernier répondait en japonais, que le secrétaire traduisait en français. Le traducteur japonais, comprenant mal le français, il lui arrivait de traduire incorrectement, si bien que M. Witte et M. Komura discutaient sur des points qui n'avaient nullement été soulevés par eux; enfin on découvrait l'erreur et l'on recommençait une discussion nouvelle.

Et pendant ce temps, de l'autre côté de l'Atlantique, à Boulogne-sur-mer, le premier congrès espérantiste mettait en présence des centaines de gens de toutes conditions, venus de vingt pays différents, et qui s'entendaient et se comprenaient à merveille.

Quel contraste! Quelle expérience décisive!

**

Je montrerai surtout l'erreur dans laquelle versent ceux qui présentent une langue auxiliaire internationale comme l'ennemi mortel des langues actuellement parlées. Je ferai voir, en particulier que singulièrement averti serait le peuple qui s'aviserait dès maintenant d'introduire l'Esperanto dans tout son enseignement officiel; chez un tel peuple, en effet, se formerait la première littérature espérantiste qui, tout naturellement, comporterait la traduction des œuvres, donc des idées nationales; et ainsi, partout où se lit déjà l'Esperanto, se liraient les œuvres capitales de ce peuple d'initiative qui en retirerait, n'est-il pas vrai, tout bénéfice! Et ce sans avoir imposé les difficultés de sa langue!

**

Je montrerai les tares de nos langues, avec exemple de formations et de déformations incessantes et non conscientes; et pourtant je ferai voir pourquoi on aime sa langue maternelle, pourquoi on l'aimera toujours; et on verra que, par les mêmes raisons que je dirai, on ne peut aimer ainsi qu'une seule langue, ne connaître à fond qu'une seule langue.

Je ferai justice de ce lieu commun: « On va partout avec le français, l'anglais et l'allemand »; cela n'est vrai que pour les voyageurs en chambre.

COMMANDANT CH. LEMAIRE.

KLARIGO.

Kelkaj esperantistoj rogas de la Belga Sonorilo ĝian opinion pri la teksto de ia karto pri novjaro:

Sinjoro K.

prezentas al vi siajn plej bonajn bondezirojn.

Tiu formo havas neutilan ripeton: pleonasmon. Krom tio la frazo estas korekta, sed ĝi estas « peza » pro la amaso da akuzativoj. Estas traduko laŭvorte el la flandra aŭ franca lingvoj.

Esperanto estas lingvo « nepeza » kaj sonora, oni plibone elektos tiun formon:

Sinjoro K.

Kun plej bona novjara deziro.

sekretario tradukis france. La japana tradukanto malbone komprenis la francan lingvon kaj okazis ke li tradukis nekorekte, pro tio S^{ro} Witte kaj Komura interdiskutis pri punktoj, kiujn ili ne intencis trakti; fine oni trovis la eraron kaj oni rekomencis novan diskuton.

Kaj dum tiu tempo, sur la alia rando de la Atlantika Oceano, en Boulogne-sur-Mer, la unua Esperantista kongreso kunigis centojn da personoj de ĉiuj situacioj, alvenitaj el dudeko da malsamaj landoj, kiuj interkonsentis kaj komprenis unu la aliajn perfekte.

Kia kontrasto! Kia decidiga eksperimento!

**

Mi montros precipe la eraron al kiu inklinigas tiuj, kiuj prezentas helpantan lingvon kiel morteman malamikon de la lingvoj nune uzitaj. Mi montros aparte, la rezultatojn, kiujn akirus la prudenta popolo, kiu de nun, enkondukus Esperanton en sia oficiala instruado; efektive ĉe tia popolo formiĝus la unua esperanta literaturo kiu, tutnature, enhavus tradukon de la verkoj, sekve de la ideoj naciaj; kaj tiamaniere, kie oni legas jam Esperanton, tie oni legus la ĉefajn verkojn de tiu iniciatora popolo, kiu rikoltus, ĉu ne vere, la tutan profiton!

Kaj tio okazus sen impono de la malfacilaĵoj de ĝia lingvo!

**

Mi montros la difektaĵojn de niaj lingvoj, kun ekzemplo de formigoj kaj aliformigoj ĉiamaj kaj senkonsciencaj; kaj tamen mi detale montros kial oni amas sian gepatran lingvon, kial oni amas ĉiam ĝin; kaj oni scios ke, pro la samaj kaŭzoj montrataj, oni povas ami nur unu lingvon, oni povas plene koni nur unu lingvon. Mi juste detruos tiun diraĉon: « Ĉie oni iras per franca, angla kaj germana lingvoj » tio estas nur vera por tiuj, kiuj vojaĝas en sia ĉambro.

KOMANDANTO CH. LEMAIRE.

Tradukis Jos. Jamin.

Reciproke.

Iu ricevis neafrankitan leteron, kiu bezonis tre multe da transporta pago. Li tamen akceptis ĝin sed, malferminte la leteron, li nur legis tion ĉi: « Via amiko fartas bone ».

Li ridis (eble kontraŭguste) kaj, la sekvantan tagon, li sendis grandegan pakadon al la farsinto kaj ankaŭ ne afrankis ĝin. La ricevanto elpagis senripoĉe la grandan transsendan koston, esperante ke li baldaŭ estos rekompencata per la enhavo de la pakajo. La kovrilo enhavis pezan ŝtonon kaj la avizon: « Kiam mi sciigis pri via bona parto, la jena ŝtono falis de mia koro ».

THEDDY.

INSTITUTO PRI INTERNACIA LEĜOSCIENCO.

Tiu Instituto estas kreita antaŭ 33 jaroj, en Gento, de Sinjoro Rolin-Jacquemyns, Gentano, kiu fariĝis konsilisto de l' Reĝo de Siam, kaj mortis antaŭ kelkaj jaroj. S^o Rolin-Jacquemyns estis unu el la plej eminentaj scienculoj kiuj okupis sin pri internacia leĝoscienco. Tiujare la Institutanoj kunvenis en Gento sub prezido de S^o A. Rolin, frato de l' kreinto kaj profesoro en la Genta Universitato. El lia grava parolado malferma, ni sciigas ke la kerno de l' Instituto lia konsistis el la dek scienculoj kiuj respondis al la iniciatoro, kaj estis S^o Besobrasof, el St Petersburg; Bluntschli, el Heidelberg; Calvo, el Buenos-Ayres; Field, el New-York; de Laveleye, el Liège; Lorimer, el Edimburgo; Mancini, el Romo; Asser, el Amsterdam; Moynier el Genève, kaj Pierantoni, el Romo; el ili, nur la tri lastaj estas ankoraŭ vivantaj. La nombro da Institutanoj iom post iom pligrandiĝis tiamaniere ke, nun, la Instituto konsistas el 50 membroj kaj 50 Societanoj, elektitaj inter la plej gloraj internacia-leĝaj scienculoj de l' tuta mondo. La celo de l' Instituto estas pristudi ĉiujn demandojn pri internaciaj rilatoj inter ŝtatoj kaj privataj personoj, kaj fariĝi anaro aŭtoritat-hava kiu agos flanke de l' diplomatiistoj, science starigante la principojn de l' internacia leĝoscienco.

La Instituto, tial, sin okupas pri la demandoj plej nuntempaj kaj novaj en tiu scienca fakoj. Ĝi rekomendis, de 1874, al la ŝtatoj, aranĝi iliajn konfliktojn per arbitracio, kaj tiu rekomendo estas jam ofte atentita. Ĝi fiksas decidojn gravajn pri la protekto de l' Suez'a kanalo kaj de l' submaraj kabloj; ĝi pritraktis demandon pri protekto de l' privata propraĵo malanika dum maraj militoj k. c., kaj ankaŭ multajn demandojn pri puna kaj komerca leĝoscienco internacia.

La influo de l' Instituto en reguligo de l' Hag'a konferenco kaj en diversaj leĝaroj naciaj, estas rimarkinda.

Ĉiujare la Institutanoj kunvenas en alia lando kaj en la tiujara kunsido en Gento, kiu daŭris de l' 20^a ĝis la 27^a de Septembro, ĝi decidis ke ĉiu milito devas esti antaŭirata de deklaro; ĝi prilaboris regularon pri la rajtoj kaj devoj de la neŭtralaj ŝtatoj dum milito; ĝi pristudis demandon tute novan pri la aerostatoj, la senfadena telegrafio kaj la submaraj esplodoj kaj torpedoj.

Unuiĝo frata internacia.

Unu el la membroj de l' preparolita Instituto pri internacia leĝoscienco, Sir Thomas Barclay, estas kreinto de tiu Unuiĝo: en Majo 1905^a, li havis kiel kunorganizantojn, S^{on} John Burns, deputato de l' ministroj ĉe la brita regnestro, kaj S^{on} Allen Baker, parlamentano, kaj post unu jaro la Unuiĝo enhavas jam pli ol 750,000 anoj! Tiu rapida disvolviĝo devenas de l' ĝustatempa celo mem de l' Unuiĝo kiu estas: « grupigi ĉiunaciajn homojn por estigi sentojn amikajn inter la popoloj kaj senkuraĝigi

ĉiujn emojn por reciproka jaluzeco kaj malkonfido. » La rimedoj por tio estas plej diversaj, sed unu estas precipe fruktoporta: la vizitoj internaciaj. Tiam viziton faris jam delegacio de l' sindikatoj laboristaj el Leicester al la estraro de l' komunuma konsilantaro pariza, dum kiu estis elparolataj tiuj vortoj: « Sin pli bone koni internacie, estas sin ami. » — S^o Barclay estas senlaca propagandisto por sia kreitaĵo: dum la lastaj monatoj, li vojaĝis senĉese tra Eŭropo kaj Ameriko kaj faris pli ol 500 paroladojn! Ofte li estas matene en ia urbo, kaj vespere li parolas en alia, je 700 kilometroj pli malproksime, haltante eĉ intertempe en diversaj lokoj por varbi novajn aligantojn. Por atingi tian aktivecon, S^o Barclay kutimiĝis dormi ĉie, tiamaniere ke inter du agoj, li ripozigas plene sian cerbon.

REĜO KAJ ESPERANTO.

Elirita el « The Daily News » January 3th 1907.

Je la dua kunsido de la ĉiujara kongreso de la Nacia Asocio de ĉefinstruistoj, kiu okazis je la 3^a de Januaro 1907, Doktoro J. C. O' Connor (Londono) diris ke li estas Esperantisto, sed li ne kredas ke Esperanto iam sukcesos escepte se la granda instruistaro de la lando instruu ĝin.

Estas multe da Esperantistoj, sed neniom da instruistoj. Esperanto plivastiĝas nuntempe kaj la gazetaro tion ekvidas. Kiam li komencis sian esperantan agadon, unu el la ĉefaj ĉiutagaj gazetoj el Londono honoris lin per artikolo en kiu la skribanto diris: « de nun, ni disiĝas de D^{ro} O' Connor kaj de lia frenezeco. Jen estas nia lasta vorto pri Esperanto. » Antaŭ 2 jaroj okazis kongreso en Boulogne, kaj apenaŭ li estis reveninta de du tagoj, kiam tiu redaktoro petis ke li skribu serion da ĉiutagaj artikoloj pri Esperanto.

Oni instruas Esperanton en la *Continuation Schools* (popolaj vesperaj lernejoj por tiuj kiuj intencas daŭrigi sian lernadon) kaj en multe da taglernejoj en Londono.

La komercaj Ĉambroj konfesis ĝian gravecon kaj la Nacia Asocio de Instruistoj metis ĝin en la programon por sia ekzameno kiu okazos en proksima Marto.

Je la Kristnaska mateno, li ricevis ĉarmegan Kristnaskan karton de la Reĝo Eduardo, kiu diris ke li akceptis grandplezure la lernolibron kaj vortaron de D^{ro} O' Connor, kaj ke li ĝojis aŭdi pri lia laborado.

Tradukis HAROLD PALMER.

Elirita el « La Suno Hispana » Decembro 1906.

Esperanto en la Reĝaj palacoj.

Oni tre bone scias ke la Greka reĝo estas ankaŭ fervora amanto de nia kara lingvo, kiu li lerte parolas, kaj estas pruvo ke li faras propagandon en sia familio.

La sciigo, kiun ni legis en « The Daily Chronicle » de la 26^a de Novembro, t. e. ke la princo Olaf el Norvegujo lernas esperanton, same faras la princojn de la Reĝa familio Angla.

RECETTES CULINAIRES.

Pot-au-feu écossais.

Couper en petits morceaux carrés un kilog. de rond de bœuf, y adjoindre quelques morceaux de gras de bœuf et placer le tout dans une marmite contenant quatre à cinq litres d'eau. Quand l'eau entre en ébullition, écumer, puis ajouter trois poireaux, trois carottes découpées menu et un bouquet garni. Dans l'intervalle, couper en morceaux un kilog. de pomme de terre, les faire blanchir et les insérer dans le pot-au-feu, joindre successivement un chou-rave et deux pieds de céleri en branches. Laisser au feu jusqu'à cuisson des différents légumes et de la viande. Quand le tout est à peu près cuit, fondre 50 grammes de beurre délayé dans une cuillerée de farine d'avoine, l'amener au roux foncé; mouiller ce roux avec le bouillon, le condimentier d'une sauce aux champignons en bouteille, le verser dans la marmite. Saler, poivrer, laisser reprendre un moment l'ébullition.

Le bouillon se verse dans une soupière et la viande entourée des légumes se sert dans un plat, le tout aussi chaud que possible.

DIVERSAĴOJ.

La simioj parolos. — Tion certigas grava scienculo.... amerika. Li rimarkis ke sennaza homo elparolas nur nekompreneblajn sonojn. Li do tre logike konkludis ke se la simioj ne estas kapablaj elparoli vortojn, tio devenas nur pro nesufiĉa grandeco de ilia nazo, kaj nia doktoro naz-scienca ne malpli logike opinias ke oni bezonus nur kreskigi ĉe simia kapo, homan nazon, por kapabligi niajn malaltgradajn fratojn trouzi, kiel ni, nian babilemon.

Oni eĉ diras ke la amerika doktoro fortranĉos sian propran nazon por ĝin alglui al la vizaĝo de la unna kiun oni alportos al li, ĉar kie estus ja trovebla homo amanta sufiĉe simion por volonte donaci sian nazon al tiu homa (ne! besta) speco?

Superstiĉo de Goethe. — El antaŭvorto kiun Blaze de Bury estis skribinta por la traduko de Faust, aperas ke Goethe estis tre superstiĉema. Tion provas jena anekdoto:

Post la kunveno en Erfurth, Napoleono estis donacinta sian miniaturan portreton al Goethe kaj ankaŭ la ateston de l' Honora Legio. Tiu portreto, pendigita proksime de l' spegulo de lia dormoĉambro, estis fariĝinta por Goethe kvazaŭ idolajo. Okazis la malvenko de Waterloo. Goethe, eksciiginta, rifuzas kredi tion, kaj eĉ riproĉas al la vizitantoj kiuj persiste disrakontas la okazintaĵon.

Sed, vespere, kiam li eniris sian dormoĉambron kaj serĉas la miniaturon, li ĝin trovas, kuŝanta sur la plankajo. Li silente haltas dum momento, kaj kiam lia sekretario estis levinta la portreton, li diras: "Kion tio signifas? Ĉu efektive la novaĵo de hodiaŭ matene estus vera?"

Por la blinduloj. — En Rumanujo ekzistas, laŭ artikolo kiu eksregino Carmen Sylva publikigis en *Nene Freie Presse*, sennaaŭ 20,000 blinduloj ne flegeblaj en specialaj blindulejoj. Tial ŝi klarigas la ideon pri kreo de blindula kolonio en kiu ĉiu el tiuj malfeliĉuloj lernas apartan metion por mongajni per ĝi. Carmen Sylva opinias ke tiel naskiĝus civilizacio blindula aparta kaj progresema, ĉar la blinduloj pli ol viduloj estas kapablaj pripensi ian aferon. Ŝi nomas sian kolonion, prave, tajnas: La Lumfonto.

KUIREJAJ ORDONOJ.

Skotlanda Potsupo.

Tranĉu kvadrato malgrandajn pecojn da bova plen-viando po unu kilogramo, aldonu kelkajn pecojn da bova graso, kaj metu ĉion en bolpoto enhavanta de kvar ĝis kvin litrojn da akvo. Kiam la akvo ekboliĝas, ŝaŭmu, sekve aldonu tri porelojn, tri karotojn maldike distranĉitajn kaj « bukedon » da aromataj herboj. Intertempe, tranĉu pece po unu kilogramo da terpomoj, « blankigu » ilin kuire, kaj enlokigu en la potsupo, aldonu intersekve unu rapa-brasikon kaj du radikojn da celerio kun foliaĵo. Lasu sur fajro ĝis kuro de la diversaj legomoj kaj de la viando. Kiam ĉio estas preskaŭ kuirita fandu 50 gramojn da butero dissolvita en plenkulero da avena faruno, kuiru ĝis « malpala flavruĝo »; akvumu tiun « flavruĝaĵon » per la bolsupo, spicu ĝin per saŭco kun fungoj el botelo, versu en la kaldrono. Salu, pipru, lasu rekomenci la bolon dum momento.

La bolsupon oni verŝas en supujo kaj la viandon, ĉirkaŭitan de la legomoj, oni prezentas en plado, ĉio tiel varma kiel eble.

VATELINO.

En tiu afero tre utilus elpensitaĵo de S^o Theodorescu, blindulo kaj speciala sekretario de l' Reĝino: tiu sinjoro, efektive, faris skribi kaj presmaŝinon por blinduloj, tre facile uzeblan, kaj taŭgan por ĉiuspeca laboro: Tiamaniere estus preseblaj por blinduloj verkoj literaturaj kaj sciencaj, multe pli malmultkoste ol per la nunaj Braille'aj reliefaĵoj. Ĉu tio ne estas atentinda por ni, Esperantistoj?

« WALLONA » RAKONTETO.

La puno de la lupo.

En nia lando estis lupo, kiu manĝis multe da ŝafinoj kaj ŝafidoj, da kaprinoj kaj kapridoj. La farmmastroj tre plendis pri ĝi, ĉar ĝi ne estis satigebla. La vilaĝanoj ekĉasis por klopodi rompi ĝian kapon. La sinjoroj estis promesintaj ilin regali, kiam ili estos mortigitaj la beston. Tial, ĉiuj kuris al ĉaso kiel al festo.

Oni serĉis ĝiajn paŝsignojn sur la neĝo; oni ĝin persekutis, oni pafis, oni maltrafis, kaj oni diris ke la diablo en tio sin ekmiksigas. (La diablo estas tre utila por la ĉasistoj; ili emas kulpigi ĝin pri siaj mallertajtoj).

Fine tamen, iu, kiu estis preparinta kaptilon, ekkaptas nian rabiston je piedego. Oni enŝnurigas ĝin, kaj por ke ĉiu havu la plezuron vidi ĝin suferi kaj morti, oni fortrenas ĝin al la placo de la vilaĝo. Ĉiuj alkuras, ĉiuj ĉirkaŭas la lupon.

— Kiamaniere, oni diras, ni ĝin mortigos?
— Mi, diras la unua, mi ĝin unubate mortigos; per mia martelo mi rompos ĝiajn ostojn.
— Ne! diras la dua, ni suferigu ĝin pli longdaŭre; per pinĉilego ni fortiru ĉiujn ĝian dentojn; ĉar laŭ mia opinio, besto, kiu tiom mordis, devas pentofari per tio, per kio ĝi pekis.

La tria diris:
— Oni devas ĝin puni jene: ni ĝin senhauĝigos vivantan, kaj tra la kampoj ni ĝin forpelos senĉemizigitan.
Bona maljunulo, kiu ĝis nun nenion estis dirinta, (li havis grandan sperton) antaŭeniras kaj diras:
— Miaj amikoj, por ĝin bone puni, jen mia opinio: ni ĝin edzigu! Tio estas la plej granda puno, kiun oni povas eltrovi.

Laŭ versaĵetoj de D^{ro} VERMER en Beauraing, trad. D^{ro} MELO.

BIBLIOGRAFIO.

Ĉe F. Wenk, *Albananlage*, 7, Basel (Svisujo).

Wilhelm Tell, kvinakta dramato de Schiller; laŭ la *versmetro de la germana originalo, esperantigita de L. E. Meier*, fr. 1,70
Tiu libro estas jam preparolita en *Belga Sonorilo* junia (p.112a). Ĝi estas ja nova grava afero por nia lingvo, malgraŭ kelkaj eraretoj renkonteblaj; la aŭtoro uzas iom tro ofte la senvastigon de ĉiuspecaj gramatikaj finaĵoj: substantivo kaj adjektivo, verbo kaj adverbo, la akuzativa *n* kun la multnombra signo *j*. Oni renkontas la vortojn *ankor'*, *inteligon* kaj *seninteligaj*, anstataŭ *ankoraŭ*, *inteligenton* kaj *seninteligenta* (eble pres-eraroj).

Iom teda ŝajnas la ofta uzo de l' vorteto *do*. Oni povus iafajne ĝin anstataŭigi per *ja*; eble ankaŭ per *nu*.

Tiuj eraretoj verŝajne malaperos kiam oni pretigos la duan eldonon. Ili deprezas nenion de la funda valoro de la libro, tre leginda de tiuj kiuj ne povas kompreni la germanan tekston.

Ĉe *Typografia moderna*, Avellanas, 11, Valencia (Espanje):

Kuraĉisto por batoj, triakta proza komedio de Leandro Fernandez Moratin, *tradukis Vicente Inglada* . . . fr. 0,50
Tiu ĉi verketo estas publikigita po kajeretoj kvarpaĝaj en *La Sano Hispana*, kaj nun eldonita en aparta broŝuro. La nomo de la tradukinto estas rekomendo sufiĉa. La tralego de « Kuraĉisto per batoj » estas agrabla, interesa, instruo plena: la leganto ĉuj sentas kiam la tradukinto pristudis kaj zorgis sian taskon, kiom li penas uzi la ĝustan vorton.

Oni riproĉos nur unu afereton al la tradukinto: ke li eĉ nur kelk-linie, ne koniĝis la aŭtoron al sia legantaro, ĉar ni dubas, ĉu, ekster la kleruloj, iu nehispano scias ke Moratin vivis de 1760 ĝis 1828, ke li precipe alfaris al hispana lingvo alinaciacajn teatraĵojn, ke « Kuraĉiston per batoj » li prunteprenis el Molière, k. c. La celo, kiam oni tradukas naciajn aŭtorojn, estas ja ilin konigi al la tuta mondo, kaj noteto biografija estas nepre plenigo kompreniga por la traduko.

Ĉe la aŭtoro, S^o Jimenez Loira, *strato Paz* 20, Valencia (Hispanujo).

Verba Amuzajo, . . . » 0,10
Sub logika kaj amuziga formo, intersekvancaj frazoj donantaj, kun hispana traduko, la precizan signifon kaj uzon de ĉiu esperanta verba formo.

Ĉe S^o Ĉejka, en *Bystřice-Hostýn* (Moravujo):

Esperanto, vortaro Esperanto Ĉesky . . . fr. 0,90
Esperanto, neutralni jazik mezinarodni, klarigo de la gramatiko. . . » 0,20
Esperanto, neutralni jazik mezinarodni, gramatiko kun la ekzercaro de D^o Zamenhof, el la kolekto aprobata . . . » 1,10
El la historio de Esperanto, letero pri la deveno de Esperanto, paroladoj de D^o Zamenhof kaj K. Bein. . . . » 0,35

Esperanto-Leitfaden, . . . » 0,25
mallonga klarigo de la gramatiko, kun praktikaj ekzercoj kaj vortareto; bonega propagandilo por Germanoj.

Ĉe *Librejo Hachette*, 79, *Boul. St. Germain*, Paris:

Eneido, de Virgilio, trad. D^o Vallienne . . . » ?
Jam ekzistis tradukaĵo de l' kantoj I kaj II.
D^o Vallienne daŭrigis, kaj prezentas nun la tuton. Ŝatinda afero, por tiuj kiuj ne havis okazon lerni la latinan lingvon kaj, sekve, ne povas legi la originalon.

L'Héritage Klodarec, unuakta komedio, francalingva, de S^o de Ménil . . . » 0,75
Propaganda teatraĵo, alpreninda kaj ludinda de ĉiuj grupoj en francalingvaj landoj.

Iu notario ne ŝatas ke lia ĉef-oficisto legu esperantan gazeton, kaj forpelas lin pro tio. Sed jen alvenas du klientoj: unu hispana, unu germana, kies ambaŭ kunhelpo estas necesa por aranĝi heredaĵon el kiu la notario estas ĉerponta gravan

profiton. La klientoj ne interkomprenas sin, kaj ankaŭ ne komprenas la notaron.

Subite, ili vidas ke la forpelita, tuj elironta, oficisto tenas en sia mano esperantan gazeton kies titolo aperas antaŭ iliaj okuloj. Kaj ili ambaŭ ekcrias:

« Ĉu vi parolas Esperanton? »

Oni antaŭsentas la finon.

Kial oni ne tradukus tiun komedion en aliaj lingvoj.

Ĉe S^o Delmas, eldonisto, 10, *rue St Christoly*, Bordeaux, (Francujo):

Delmas'aj helpaj bildoj, por la praktika instruado de l' modernaj lingvoj per bildaro.

Vere oportuna sistemo por instrui la fremdajn lingvojn per la senpera metodo: desegnaĵoj ĉu sur grandaj folioj por pendli ĉe l' muro, ĉu en kajeroj kunporteblaj. Ili prezentas scenojn de la ĉiutaga vivo, kaj ĉiu objekto, ĉiu persono havas numeron kiu resendas al

Klariga libreto. Tiu ĉi ekzistas en diversaj lingvoj: franca, germana, angla, itala, hispana, rusa, esperanta, landra.

La esperanta libreto estas verkita de S^o de Beaufront.

Jen la prezoj:

1 ^a kajero, 6 bildaj folioj	fr. 2,00
2 ^a » 10 » »	» 3,00
Muraj folioj, koloraj, 90 c. x 1.29, kun lignaj vergetoj:	
1 ^a serio, 6 bildaj folioj	» 25,00
2 ^a » 10 » »	» 41,00
Plena kolekto	» 61,60
1 folio izola	» 4,60
Klariga libreto, franca-lingva	» 0,85
» » rusa-lingva	» 2,00
» » de ĉiuj aliaj, jam montritaj, lingvoj	» 1,25

Jen estas iloj vere bonaj ne nur por instrui Esperanton, sed ankaŭ fremd-naciajn lingvojn.

Ĉiuj grupoj devas aĉeti la tutan aron, se ili estas sufiĉe riĉaj: ĉar multaj grupanoj povos, el tiu eldonaĵo, ĉerpi profiton neantaŭviditan.

En Loveno, la 28^a de Dec. 1906.

Al la tre honorinda Prezidanto kaj al la tre estimataj komitatanoj de la Belga Ligo esperantista.

Karaj Sinjoroj!

Mi havas la honoron sendi al vi ekzempleron de la esperanta gramatiko kiun mi eldonis antaŭ kelkaj semajnoj.

Vi bonvolos rimarki:

- 1^o) ke mia verketo estas tute konforma je la Zamenhofaj reguloj;
- 2^o) ke ĝi enhavas ĉion kio estas necesa por bone legi kaj por plej korekte redakti per ĝi;
- 3^o) ke ĝia duobla metodo celas fari lertajn esperantistojn kiuj redaktos per vera esperanta stilo;
- 4^o) ke ĝia duobla enhavtabelo permesas al ĉiuj, eĉ al tiuj kiuj neniam lernis Esperanton, tuj korekte redakti esperante kaj tuj respondi ĉiujn gramatikajn demandojn;
- 5^o) ke ĝi estas tute originale verkita, alivorte, ke ĝi estas propra, persona verko;
- 6^o) ke ĝi enhavas multajn novajn rimarkojn kaj konsilojn kiujn oni serĉus vane en aliaj similaj libroj;
- 7^o) ke, pro ĝia malalta prezo, ĝi ne celas mongaŭnon por sia verkinto, sed nur propagandon por Esperanto;
- 8^o) ke ĝi invitas siajn legantojn aboni je la *Belga Sonorilo*, anĝi en la *Belga Ligo esperantista*, aĉeti la verkojn de belgaj esperantistoj, kaj mendi esperantajjn librojn presitajn en Belgando;
- 9^o) ke ĝi do estas vera belga entrepreno.

Tial mi esperas

ke ĉiuj esperantistoj subtenos mian entreprenon;
ke precipe miaj samlandanaj samideanoj min helpos en ĝi;
ke la Estraro de la Belga Ligo esperantista decidos, per sia duonmonata gazeto konatigi mian libron;
ke la Ligo komitato donos al mi sian moralan kaj monan helpon, ĉu mendante nombron da ekzempleroj, ĉu donacante helpemonon, ĉu per ĉiu alia rimedo.

Mi prezentas al vi, Karaj Samideanoj, kun miaj plej sinceraj salutoj kaj, okaze la jarkomenco, miaj plej koraj bondeziroj, mian plenan dankon.

E. MATHYS, FILO.